Intertempe la komunikado kaj diskutoj inter aktivuloj multe malpli efektiviĝas papere kaj per analogaj kontaktoj, sed plej ofte per la interreto, virtualaj kunsidoj kaj retpoŝto. Krome, la Flandra registaro postulas ke protokoloj pri estrarkunsidoj kaj ĝeneralaj membrokunsidoj estu publikigitaj nederlandlingve. Tamen, konforme al la celo de nia organizo, ĉiam aldoniĝas Esperanta versio. Trie, la nova leĝo pri entreprenoj kaj asocioj (2023) postulas, ke ĉiu asocio havu registron en kiu ĉiuj membroj povas konsulti la protokolojn. Tio estas la nova rolo de *VERTIKALE* / *VERTIKAAL*, kiu disponeblas surpapere en la Esperantodomo, Lange Beeldekensstraat 169, 2060 Antverpeno, kaj cifere sur nia retpaĝo <https://www.esperanto.vlaanderen/aktivuloj/>.

Legu plu ĉe paĝo 17



Ondanks mijn beperkte computer-vaardigheden en -ervaringen, ben ik erin geslaagd een nieuw nummer van *VERTIKALE* samen te stellen: 2025.01. Het bevat de notulen van de bestuursvergaderingen van 23/10/2021 en van de vijf vergaderingen van 2022, en van de algemene ledenvergaderingen van 2022. De laatste in *VERTIKALE* verschenen notulen waren die van de bestuursvergadering van 04/09/2021 en van de algemene ledenvergadering van 13/03/2021. Meer notulen volgen in de komende nummers.

VERTIKALE, in het Nederlands “Vertikaal”, is een nieuwsbrief voor bestuursleden en actieve leden van de Vlaamse Esperantobond. Het verscheen voor het eerst in de zomer van 1992 als opvolger van *Informilo*, dat zich in mei 1981, niet lang na de stichting van V.E.B., voorstelde als “nieuwsbulletin voor kaderleden van V.E.B.” Het was het Esperantotijdschrift van de V.E.B., naast het Nederlandstalige *Horizon.taal*.

Intussen verlopen de communicatie en discussies tussen actieve leden veel minder op papier en via analoge contacten, maar veel meer via het internet, virtuele vergaderingen en e-mail. Bovendien vereist de Vlaamse regelgeving dat notulen van een vereniging in het Nederlands gepubliceerd worden. Overeenkomstig het doel van onze vereniging wordt altijd een Esperantoversie bijgevoegd. Tevens vereist de nieuwe wet inzake vennootschappen en verenigingen (2023) dat elke vereniging een register bijhoudt, waar elk lid de notulen kan inkijken. Dat is de nieuwe rol van *VERTIKALE* / *VERTIKAAL*. Van het tijdschrift is een papieren versie beschikbaar in het Esperantohuis, Lange Beeldekensstraat 169, 2060 Antwerpen, en een digitale versie op onze website <https://www.esperanto.vlaanderen/aktivuloj/>.

Lees verder op Blz. 17

FORPISIS RENATO CORSETTI (1941-2025), HONORA PREZIDANTO DE UEA

Renato Corsetti is niet meer. Elke esperantist, die een beetje Esperantujo volgt, zal wel ooit eens zijn naam zijn tegengekomen. Hierna een korte biografie en een boodschap van medeleven die ik namens het VEB-bestuursorgaan heb overgemaakt aan zijn echtgenote Anna Löwenstein. Mevr. Löwenstein is auteur van diverse boeken die door de VEB zijn uitgegeven en is o.a. proofreader van andere uitgaven van de VEB.

UEA profunde bedaŭras informi, ke forpasis D-ro Renato Corsetti (naskiĝis la 29-an de marto 1941) la 1-an de februaro 2025, en la aĝo de 83 jaroj, en Londono. Eksa prezidanto de UEA (2001-2007) kaj Honora Prezidanto de UEA kaj TEJO, li estis multfaka kaj energia kunlaboranto kaj unu el la plej eminentaj figuroj en la esperantista movado, kaj en la itala kaj en la internacia, ekde siaj junaj ĝis siaj lastaj jaroj.

Naskiĝinta en Romo, li komencis sian profesian karieron en banko. Li ekaktivis en la Esperanto-movado fine de la 1960-aj jaroj kaj baldaŭ poste iĝis Prezidanto de TEJO (1971-1973). La Estraron de UEA li unue eniris en 1980 kaj oficis ĝis 1986; denove en 1998 kiel Vicprezidanto kaj en 2001 kiel Prezidanto de UEA. Dum sia longa kariero en UEA li aktivis en multaj komisionoj kaj kunlaboris en multaj projektoj kun aktivuloj tra la mondo, ekzemple en la Instituto Hodler '68, kie li estis Prezidanto (1980-1986) kaj Vicprezidanto (ekde 2002). En 2011, rekonante lian longdaŭran agadon por la Asocio, la Komitato de UEA deklaris lin Honora Membro kaj en 2023 nomumis lin Honora Prezidanto okaze de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto (UK)


en Torino. Li ankaŭ ricevis la Premion Deguĉi en 2008. Krom siaj honoraj titoloj kaj premioj en UEA li ankaŭ estis Honora Prezidanto de TEJO.

En la pasintaj kelkaj jaroj li aktive kunlaboris por informa agado de UEA, kunordigante projektojn pri disvastigado de afiŝoj rilate al lingva justeco kaj okaze de la Esperanto-Tago kaj la Tago de la Gepatra Lingvo. Krome lia agado ne limiĝis en UEA kaj TEJO: li ankaŭ estis estrarano kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio dum pluraj periodoj. Li estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en 1998.

Li estis lingvisto kaj profesoro, ofte prelegante aŭ verkante en Esperanto kaj en la itala pri lingva politiko, Esperanto, infana dulingveco, psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. Li aŭtoris multajn artikolojn kaj librojn. Li instruis psikolingvistikon en la Universitato "La Sapienza" de Romo en la 1990-aj jaroj kaj estis profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San-Marino.

UEA perdis ne nur eksan prezidanton, sed ankaŭ gravan kunlaboranton, amikon kaj unu el la plej gravaj motoroj en la moderna historio de la Asocio. UEA esprimas siajn profundajn kondolencojn al la tuta familio, ĉefe al lia edzino Anna Löwenstein, mem Honora Membro de UEA kaj eminenta Esperanto-instruisto, kaj al liaj tri filoj.

*Gazetara komuniko de UEA
de la 1-a de februaro 2025*





Kara s-ino Löwenstein
kaj proksimuloj de Renato,

Nome de Flandra Esperanto-Ligo ni sincere esprimas niajn kondolencojn al la proksimuloj de Renato.

Pluraj flandroj diversmaniere kunlaboris kun li i.a. kadre de UEA. Ekde la pandemio, multaj el niaj samlandanoj konatiĝis kun li dum la multnombre ĉeestitaj retaj prelegoj okazigitaj alterne de la antverpena kaj londona kluboj ĉiuvendrede. Li estis kun sia edzino Anna la motoro de la londona organizado. Mi persone havis la honoron renkonti lin rete koncerne lian projekton organizi retan kurson en ĉi lando en Eŭropo.

Sed liaj meritoj estas multnombregaj. Esperantujo perdas pilieron de la movado.

*nome de la estraro de FEL
Piet Glorieux
Prezidanto*

Daŭrigo de paĝo 15

Ĉar ĝi ne estas dissendata kiel *Horizon.taal*, *VERTIKALE* estas multe malpli konata ĉe niaj membroj ol sia nederlandlingva egalulo. Mi esperas, ke ĉi tiu artikolo pliatentigos niajn membrojn pri ĝia ekzistado.

Mi koncedas, ke protokoloj kaj raportoj ne estas la plej allogaj tekstoj kiujn produktas asocia administracio. Tamen, ili estas nepraĵoj, reflektantaj la iradon de nia organizo kaj la ideojn de ĝiaj estraro kaj administrantaro. Tial, mi prenas la tempon zorgige redakti ilin kiel dokumentojn enhave korektajn, bone kompreneblajn kaj ne tro sekajn. Protokoloj ja estas la memoro de asocio, ĉu ne?...

*Johan Van Eenoo
Sekretario*

Vervolg van blz. 15

Omdat het niet rondgestuurd wordt zoals *Horizon.taal*, is *VERTIKALE* bij onze leden veel minder bekend dan zijn Nederlandstalige evenknie. Ik hoop dat dit artikel onze leden meer bewust zal maken van zijn bestaan.

Toegegeven, notulen en verslagen zijn niet de aantrekkelijkste teksten die de administratie van een vereniging voortbrengt. Toch zijn het noodzakelijkheden, die de werking van onze vereniging en de visie van de bestuursleden en effectieve leden weergeven. Daarom neem ik de tijd om ze op te stellen als inhoudelijk correcte, goed begrijpbare en niet al te droge teksten. Zijn notulen tenslotte niet het geheugen van een vereniging?...

*Johan Van Eenoo
Secretaris*

DE VLAAMSE ESPERANTOBEWEGING IN DE OORLOGSJAREN 1940-1945

Bij het rondsturen van een “herontdekt” Esperantoartikel uit het tijdschrift Esperanto Internacia (1946), van de hand van Emiel Cortvriendt (†1991), bleek duidelijk belangstelling te bestaan voor de inhoud ervan: een schets van de positie van Flandra Ligo Esperantista, voorganger van de huidige Vlaamse Esperantobond, tijdens de Tweede Wereldoorlog. Daarom hierbij de tekst in enigszins vrije vertaling.

“... Tijdens de Pinksterdagen van het jaar 1940 zou te Brussel het XI-e congres van Fl.L.E. plaats vinden. Ondanks het feit dat die tijd een hoogtepunt was van de, in heel Europa, hooggespannen sfeer, waren toch 118 personen ingeschreven. Dit had dus een vrij bescheiden maar toch bemoedigende jaarlijkse bijeenkomst kunnen worden voor de Esperantosprekers. Echter begon de invasie, net de dag vóór de aanvang van het congres. Een waterval van gebeurtenissen overspoelde elk georganiseerd leven, en liet enkel puinhopen en wanorde achter.

Doch uit het nabije Nederland bereikte ons spoedig hoopvol nieuws: de bezetters leken de Esperantobeweging niets in de weg te leggen. Deze bijna ongeloofwaardige houding – overigens van korte duur – vormde een aanmoediging voor het bestuur [van Fl.L.E.] om hoe dan ook op een of andere manier de werking verder te zetten. En zonder verwijl werd daarom contact genomen met de betrokken instanties om officiële toestemming te bekomen. Deze pogingen leverden echter niets op, en het was duidelijk dat voor de vereniging slechts één mogelijkheid overbleef: ondergronds gaan.

Om te beletten dat bij mogelijke confiscatie het volledig archief van *Flandra Ligo Esperantista* en van *Flandra Esperanto-Instituto* zou in beslag genomen worden, werd het grootste deel ervan in veiligheid gebracht. De boekhouding werd afgesloten voor de schijn. En midden januari 1941 verscheen zonder toelating de *Mededeelingen voor den Vlaamschen Esperantist* als tweemaandelijks, achtbladig, Nederlandstalig en voorlopig tijdschrift. Dit werd verzonden aan 500 van de meest trouwe en actieve leden. Het bemoedigend effect ervan kan men zich wel inbeelden.

Op verschillende plaatsen schepten de leden nieuwe moed. Cursussen werden georganiseerd en het plaatselijk verenigingsleven herpakte zich. Er verschenen achtereenvolgens vijf nummers van het voorlopige blad. Maar toen het zesde werd gedrukt, liep het mis. De *Sicherheitspolizei* ofte *Gestapo* kwam op bezoek bij onze voorzitter dr. T. van Gindertaelen. Terwijl ze hem een exemplaar van de *Mededeelingen voor den Vlaamschen Esperantist* onder de neus duwden, eisten ze uitleg. Er volgde een ondervraging en huiszoeking bij onze drukker. Fl.L.E. werd gesommeerd elke activiteit stil te leggen en niets meer uit te geven.

Het einde van 1941 was voor ons zowel bedroevend als verheugend: *Paco kaj Justeco*, onze plaatselijke afdeling in Brugge, nam de fakkel over. En in december begon, eveneens zonder



Herinnering aan de vooroorlogse congressen van Flandra Ligo Esperantista

MEDEDEELINGEN VOOR

DEN VLAAMSCHEN ESPERANTIST



Alleen voor leden van den Vlaamschen Esperantistenbond

Redactieadres : Piet van Humbeekstraat 3, Brussel-West

5.

SEPTEMBER-OCTOBER

1941

Spijts talenchaos : Esperanto niet gewenscht ?

De verslagen die begin September in de pers verschenen over het zomerfeest der europeesche jeugd te Breslau, hebben onwillekeurig bij ons bovenstaande overweging gewekt.

Als voorstander van een hulptaal, voorbehouden voor de betrekkingen op internationaal gebied, waken alle bijeenkomsten met internationaal karakter in hooge mate onze belangstelling; want automatisch rijst bij ons de vraag : hoe was het er op taalgebied gesteld ?

Wefnu, al werd in de verslagen over taalmoeilijkheden geen woord gerept, toch durven we aan de hand derzelve beweren, dat dit feest, waarmee men vnl. internationale verbroedering op het oog had, eens te meer het bewijs bracht, dat het gebrek aan een gemeenschappelijk middel voor het uiten van gedachten en gevoelens, de geestelijke toenadering op dergelijke bijeenkomsten in hooge mate belemmert.

De jeugd van 17 naties was er vertegenwoordigd, en werd aan het station door een reusachtig spandoek in evenveel talen verwelkomd. Tot hier geen zwaarigheden van taalkundigen aard, al waren de welkomgroeten in verhouding in miniaturletter, en noodgedwongen in zekere rangorde gesteld.

We staan echter sceptisch tegenover de bewering, dat onmiddellijk een spontaan en direct contact tusschen al de jeugdige deelnemers tot stand kwam. We zien immers niet in door welk wonder de aanwezige Noren met de Italianen, de Nederlanders met de Bulgaren, de Finnen met de Slowaken, de Duitschers met de Spanjaarden, de Portugeezen met de Hongaren en de Vlamingen met de Kroaten van gedachten konden wisselen. Enthousiasme en enorm veel goeden wil zijn nog niet voldoende om een volledig contact mogelijk te maken ! En in volgende passus der welkomrede van jeugtleider Baldur von Schirach zien we een onbewuste zinspeling op de bij die gelegenheid heersende taalmoeilijkheden : « Al spreken we verschillende talen, toch kloppen onze harten eensgezind. »

« Door samenwerking als volwaardige leden van een lotsverbonden volkerencomplex naar een europeesche orde, en geenszins door

33

Tijdschrift uitgegeven door
Flandra Ligo Esperantista in 1941

vergunning, het uitgeven van een maandelijks, zesbladig bescheiden, gestencild tijdschriftje. Dankzij onze Esperanto-hardnekkigheid was er heel de oorlog in Vlaanderen een eigen ledenblad.

Intussen liet het gewestelijk bestuur zich niet afschrikken door het opgelegd verbod. In plaats van *Flandra Ligo Esperantista* ageerde *Flandra Esperanto-Instituto*. Deze laatste bezorgde informatie over beschikbare boeken, en n.a.v. de Dag van het Boek in december 1943 gaf de instelling een uitgebreide geïllustreerde boekencatalogoog uit, 12-bladig. Tijdens de oorlogsjaren spendeerde *Flandra Esperanto-Instituto* de ronde som van 75.000 franken!

Wanneer uiteindelijk de bevrijding kwam, plukten we de vruchten van ons obsessief volhouden. Een bevraging toonde aan dat op 57 plaatsen in Vlaanderen een kern overbleef van *samideanoj* die bereid waren de handen uit de mouwen te steken. We bereikten ten volle ons doel: het Esperanto-waakvlammetje laten branden opdat we snel zouden kunnen heropstarten bij het einde van de oorlog. Zo konden we, na het nemen van een aantal hindernissen, in de eerste plaats de papierschaarste, onze *Flandra Esperantisto* weer maandelijks in groot formaat laten verschijnen, en dit vanaf mei 1945."

Cyreen Knockaert

GREZILJONO INVITAS AL SIAJ KURSOJ

La franca esperantista kastelo Greziljono invitas al siaj kursoj en 2025:

18-27 aprilo

PRINTEMPAS

intensivaj kursoj por ekzamenoj kun kvar famaj instruistoj: gresillon.org/p

30 junio – 10 julio

MARATONA ESPERANTOKURSO

kurso kun 3 instruistoj, ankaŭ por blinduloj,
kun Internacia E-Konferenco: gresillon.org/m

24-29 aŭgusto

VERDA NATURISMA SEMAJNO

kun Esperantokursoj: gresillon.org/n

24 oktobro – 2 novembro

AŬTUNAS

kursoj kaj FEI-ekzameno kun Renée Triolle: <https://gresillon.org/au>

Agendo de la sekvaj agendoj: gresillon.org/a - kontakto: kastelo@gresillon.org

VERRIJK JE ESPERANTO - 2


Al lang was de redactie van Horizon.taal op zoek naar een taaloefenrubriek. Met deze e-legant-e rubriek slaan we twee vliegen in één klap. Enerzijds is het een hommage aan de auteur van *Lerni E-legante*, wijlen Petro Desmet, die in de voorbije lente van ons heenging. Anderzijds verrijken we (hopelijk) jouw kennis van de Esperanto-woordenschat. Aan het einde van elk hoofdstuk vind je ook een klein quizje, waarvan je de antwoorden vindt op de webpagina van Horizon.taal. Meteen ook een aansporing om de website van de Vlaamse Esperantobond eens te bezoeken.

2. LA HOMA KORPO (2)

Malsupra membro

La malsupra membro, aŭ **gambo** (1), konektiĝas kun la trunko en la **kokso** (2). Oni ankaŭ nomas ĝin **kruro** (3), sed se ĉevalo havas kvar krurojn, la homo havas nur du! Fakte kruro estas la nomo de la malsupra parto de gambo, sed, kiel mi jam diris, oni rajtas uzi la vorton "kruro" anstataŭ gambo. La supra parto de la gambo, inter kokso kaj **genuo** (4) estas la **femuro** (5). La kruro, en ĝia specifa senco, montras ofte sufiĉe dikan karnopecon, kiu donas la belecon al silkaj ŝtrumpoj de junulinoj kaj estas tre virokulturanta: la **suro** (6); kiu pli simple nomiĝas **tibikarno**. Tiu peco sugestas certe bongustecon al **kanibaloj**, homkarnomanĝantoj. La plej ekstrema malsupra parto, sub la **maleolo** (7) estas la piedo. Maleolo estas la nomo de ĉiu el ambaŭ elstarajoj enen kaj elen de la kruro. La piedo finiĝas en **piedfingroj**. La dika piedfingro nomiĝas **halukso**.

La parto de la piedo kiu tuŝas la mondon nomiĝas **plando**. Se oni volas esprimi ke oni plene humiligis aŭ subigis iun, oni diras *ke oni metis lin sub la plandojn de siaj piedoj*. La supran parton de la piedo oni povas nomi la **instepo**. La ĉefa artikolo de la kruro (ne hezitu uzi la vorton kruro por tuta gambo!) estas, kompreneble, la genuo. En la genuo troviĝas la fama **menisko** aŭ per sia plena nomo la artika menisko. Ĝi ne estas ostoj sed **kartilago**. Sed la **petalo** estas la genuosto. La ostetoj de la piedfingroj nomiĝas falangoj. La kavo ĉe la malantaŭo de la genuo nomiĝas **poplita kavo**. Ni menciis la solenan nomon de la dikfingro de la piedo, ĉar la kutima nomo foje ŝajnas iom infaneca, sed aliflanke foje povas impresi pedantece uzi ĝuste tiun "veran" nomon! Kompreneble ankaŭ la dikfingro de la mano havas tian solenan nomon! Ni prisilentis ĝin, sed eble tamen utilas ĝin mencii! Ĝi estas **polekso**.




Brusto

La brusto estas la supra antaŭa parto de la trunko. Sur la brusto estas la **cicoj** (8), kiuj ĉe virinoj elstaras sur la mamoj. Sub la brusto estas la ventro. En ĝia mezo estas kaveto, kiu nomiĝas la **umbiliko** (9). La malantaŭa parto de la trunko, kiun ni nur per helpiloj povas vidi, estas la dorso. Inter la brusto kaj la koksoj estas la **talio** (10). Neniu virino ofendiĝos se vi diras ke *ŝi havas tre graciosan talion*. La **koksoj** estas la elstaraj flankaj, kie la femuro konektiĝas al la trunko.

Konata maniero de starado estas *metado de la manoj al (aŭ sur) la koksoj*. Nia sidkarno, la korpoparto sur kiu ni normale sidas, nomiĝas simple **sidvangoj**, kiel en diversaj etnaj lingvoj, aŭ, pli solene, **gluteoj**. Tiun parton oni ankaŭ senĝene nomu **postaĵo**, sed **pugo** estas nepre pli vulgara lingvouzo. La korpoparto per kiu oni **urinas** (aŭ familie "pisas") nomiĝas **peniso** ĉe viro, kaj **vulvo** aŭ **vagino** ĉe virino (familie **piĉo**). Pri vulgaraj nomoj por la peniso eĉ ekzistas vortareto! Plej ofte uzata kaj plej konata estas la vorto **kaco**. Alia vira **ornamaĵo** estas la **ĉurovujo**, familia **moknomo** por la **skroto** (11) kun la **testikoj**. Ne timu tabuvortojn, sed tamen ne sennecese afiŝu ilin!

Ĉekapaj aldonaj

La plej rekonebla parto de la homo estas, tiel ŝajnas al mi, la kapo, kaj precipe ĝia antaŭa flanko: la vizaĝo. En la vizaĝo brilas la okuloj, elstaras, en tre diversaj manieroj, la nazo kaj sin movas aŭ obstine sin fermas la buŝo. Flirtas, pendas aŭ gluiĝas, ambaŭflanke, la oreloj. Partoj de la orelo estas la **aŭriklo** (1) kaj la **orelolobeto** (2). Certe vi memoras ke la elefanto Bambio flugis, en la filmo, danke al siaj grandaj aŭrikloj. La nazo havas du naztruojn, kiuj estas apartigitaj de la **nazosepto** (3), kaj limigitaj ekstere de la du **nazloboj** (4). La parto, kiu plej bone montriĝas en silueta bildo estas la **nazponto** (5). Pri homo kiu estas orgojla oni diras ke *li tenas la nazon supren*.




Wie zijn nieuwsgierigheid naar de volgende hoofdstukken niet kan bedwingen, kan *Lerni E-legante*, dat uitgegeven is door de Vlaamse Esperantobond, natuurlijk ook aankopen via de VEB-webwinkel.

Lerni e-legante
ŝtupoj al pli vasta vortprovizo

<https://mallonge.net/retbutiko-leleg>

La vizaĝparto super la okuloj estas la **frunto (1)**, kiun oni sulkgigas kiam oni intense pensas. Flanke estas la **tempioj (2)**, kaj sub la okuloj estas la **vangoj (3)**. Iuj homoj havas amuzajn kaj ĉarmajn **vangopometojn**. Cetere ankaŭ la **okulglobo** foje nomiĝas pomo. La precipe ĉe viroj aperanta kaj moviĝanta dikaĵo de la gorĝo nomiĝas **gorĝa pomo (4)** aŭ **Adampomo**. Tamen ne estas bona ideo nomi la kapon pomujo!

Sub la nazo estas iu vertikala **sulketo**, kies nomo estas **filtrumo (5)** kaj kiu finiĝas ĉe la supra lipo. Tiel ni alvenas ĉe la buŝo. En la buŝo estas la dentoj kaj la lango. Homo kun plena dentaro havas 32 dentojn, sed en sia juneco la infano havas **laktodentojn**. La laktodentoj nur iom post iom forfalas kaj estas sekvataj de la dentaro de plenkreskulo. La **dentaro (6)** estas sufiĉe kompleksa. Oni distingas tri specojn de dentoj: la **tranĉodentojn** aŭ **incizivojn**, la **kojnodentojn** aŭ **kaninojn** kaj la **vangodentojn** aŭ **molarojn**. Plej ofte oni ankaŭ distingas la antaŭmolarojn de la veraj molaroj. La suprajn kaninojn oni ankaŭ nomas **okuldentojn**. Multaj homoj suferas dum la vivo dentodoloron, kaj akiras truajn dentojn. La dentoj iĝas **kariaj**. Ofte necesas ke dentokuracisto plumbu aŭ eventuale eltiru ilin. Finfine ofte homoj ricevas falsan, artefaritan dentaron.



Por forigi karion la dentisto uzas borilon. Jes, timiga vorto! Feliĉe nuntempe ekzistas treege rapidturnaj aparatoj, kiuj ebligas fari la necesan truon fulmrapide. Poste la dentisto plenigas la truon per **plombo**. Tiu operacio nomiĝas plombado. La uzata materialo ĉe plombado multe evoluis dum la pasintaj jardekoj. Mi pensas ke oni nun ne plu uzas **amalgamon**, kiu estis kunmiksaĵo de **hidrargo** kun metalo. Rezulto de plombado estas, kompreneble, plombaĵo. Normale la tuta operacio de borado kaj plombado okazas post apliko de **sendolorigilo**.

Aldonaj Informoj


1. Plia helpo, en bilda formo, estas trovebla en nia PIV; sed estas bone scii ĉe kiu vorto vi serĉu. Vi serĉu ĉe: korpo.
2. Pliaj vortoj estas troveblaj, kompreneble, en niaj bildvortaroj. En EBV: 18, 21 - en BVE: 19, 22.

Taskoj kaj ekzercoj

1. Ofte aŭdata ŝerca enigmo estas jena: Se en la lasta tago ni ĉiuj, nudaj, staras en granda grupo antaŭ la fina juĝo... kiel oni povas tuj rekoni Adamon kaj Evon? Respondo: ili ne havas... Ĉu vi scias kio mankos? Ĉu vi povas klarigi? La bezonata vorto estas en tiu ĉi leciono! [en la parto brusto].

2. Kial oni ne nomu la kapon "pomujo"? Kial oni jes ja rajtas nomi ĝin pomujo? Ĉu vi apogas jes aŭ ĉu vi apogas ne?

3. Esperanto havas plenan vastan esprimaron (vidu la libron "Esprimaro, Promenoj en Edeno") kaj inter ili troviĝas diversaj kiuj enhavas la vorton "dentoj". Tiel estas "*kunpremi la dentojn*" kio signifas **obstini**. Ankaŭ estas "*montradi la dentojn*" por esprimi ke oni **minacas**. Kaj oni povas *grincigi la dentojn*, pro sufero sed ankaŭ pro **kolerego**. Oni ankaŭ foje legas ke iu "*estas armita ĝis la dentoj*" kio, kompreneble, estas troigo... sed de ĉiu komprenata. Kaj kio signifas: "*li havas dentojn ne por parado?*"... Klarigu! Tiuj esprimoj apartenas al la Esperanta lingvo, sed ankaŭ al multaj etnaj lingvoj. Tamen ne ĉiu etnolingva esprimo konservas sian sencon se ĝi estas tradukita en Esperanton! En la nederlanda oni uzas la esprimon "*meti siajn dentojn en io*" kun la signifo "intense okupiĝi pri io" ... Ĉu ankaŭ en via lingvo? Kaj kiel vi esprimus tiun ideon en nia lingvo?



4. La bela bildo de la homa korpo estas la 5,17 metrojn alta statuo "Davido" de Mikelanĝelo, bildo de blanka marmoro el Kararo (Italio). Ĝi troviĝas en la "Galerio de la Akademio" en Florenco. Kion vi scias pri tiu "Davido"?

KVIZO ĈAPITRO 2

- Kiu verbo esprimas "verzwikken" / "... al si la piedon."?
- Kiun substantivon PIV priskribas kiel "Trompi la publikan opinion, prezentante al ĝi la malveraĵojn sub oficiala, insista, alloga formo" (hersenspoelen)?
- Plenigu la mankantan vorton: "Steek je neus niet in andermans zaken." – "Ne ŝovu vian nazon en fremdan ..."

Vi trovos la respondojn en la Horizon.taal-retpa.o www.esperanto.be/fel/nl/hor.php

Esperantoclubs in Vlaanderen

www.esperanto.be/groepen

ANTWERPEN

Esperanto-Antwerpen, p/a Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen, tel.: 03 234 34 00, esperanto-antwerpen@esperanto.be - www.esperanto.be/antwerpen

La Verda Stelo: Klaas Dijkstra (voorzitter)

BRUGGE

Paco kaj justeco, Heidi Goes, Assebroeklaan 2, BE-8310 Brugge, tel.: 050 67 51 78, heidi.goes@gmail.com - <https://paco-kaj-justeco.weebly.com>

GENT

La Progreso, Katja Lödör, Peter Benoitlaan 117, BE-9050 Gentbrugge, tel.: 09 230 16 77, gent@esperanto.be - www.esperanto.be/gent

KALMTHOUT

La Erikejo, Mireille Storms, Douglaslaan 14, BE-2950 Kapellen, tel.: 03 666 83 19, mireillestorms@hotmail.com - <https://laerikejo.wordpress.com>

KORTRIJK

La Konkordo, Piet Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8 bus 0201, BE-8610 Kortemark, tel.: 0472 25 79 18, piet.glorieux@gmail.com, Jean-Pierre Allewaert, Leeuw van Vlaanderenlaan 35/0011 8500 Kortrijk, tel.: 056 20 07 96, esperantokortrijk@hotmail.com - www.esperanto-kortrijk.info

LEUVEN

Esperanto 3000, Myriam Van der Steen, Albert Stainierstraat 1, BE 3001 Heverlee, tel.: 0497 47 35 38, leuven@esperanto.be - www.esperanto3000.be

LIMBURG

Limburgse Esperantovereniging, Henri Schutters, Panhovenstraat 10, BE-3930 Peer, tel.: 011 63 55 92, henri.schutters@skynet.be - www.esperanto.be/limburg

OOSTENDE

La Konko, Anne Brabant, Duinenstraat 74 /0201 BE-8400 Oostende, tel.: 059 44 82 50, anne.brabant@telenet.be - www.esperanto.be/oostende

ROESLARE / TIELT zie KORTRIJK

Bestuursleden van FEL

Voorzitter: Piet Glorieux
Secretaris: Johan Van Eenoo
Penningmeester: (vacant)
Bestuursleden: Alex Humet, Ben Indestege

Andere nuttige adressen

Vlaamse Esperantobond / Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169, BE- 2060 Antwerpen, tel.: 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be - www.esperanto.be

Belga Esperanto-Federacio (BEF), Yves Nevelsteen, yves.nevelsteen@gmail.com - www.esperanto.be/bef

ILEI-Belgio (Esperanto-leraars), Marc Cuffez, Torhoutsesteenweg 453 bus 0003, BE-8400 Oostende, tel.: 0486 36 23 65, flandrio@hotmail.be
<https://ilei.info>

Esperanto-Numismatika Asocio (ENA), Bert Boon, Lijsterbeslaan 13, 9630 Munkzwalm, tel.: 0472 73 48 30, bert.boon@skynet.be

Verdaj Skoltoj

p/a Valère Doumont, Rue des Champs, 3 5060 Sambreville, tel.: 0485 51 75 52, info@verdajskoltoj.net - www.verdajskoltoj.net

Valona Esperanto-asocio, V.Esp-o

p/a Jean Annet, Rue de la Terre Franche 31 - 5310 Eghezée, tel.: 0495 10 32 30, esperanto.wallonie@gmail.com

Esperantista Brusela Grupo vzw (EBG) sekretariejo: p/a Yves De Keyzer, Perkstraat 78, BE-1630 Linkebeek tel.: 0498 04 00 95; sekretario@esperantobruselo.org - www.esperantobruselo.org/nl
Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, BE-1640 Sint-Genesius-Rode

Esperanto Nederland, secretaris, Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, tel.: +31 (0)50 5718842
sekretario@esperanto-nederland.nl - www.esperanto-nederland.nl/groepen

Hoofdkantoor van de Esperanto Wereldvereniging/Centra Officejo de UEA Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, tel.: +31(0)104 361 044, uea@co.uea.org - www.uea.org

www.esperanto.be/horizontaal



<https://esperanto.events>

plusendas al

<https://eventaservo.org>

Eventoj en via regiono aperas en Eventa Servo de UEA. Jen la facilaj landaj ligiloj:

- Belgio be.esperanto.events
- Francio fr.esperanto.events
- Germanio de.esperanto.events
- Nederlando nl.esperanto.events

Ekzistas tia ligilo por ĉiuj landoj de la mondo!

Estas tre facile por:
komuniki, memori,
tajpi – ankaŭ por
ne-esperantistoj!